

# La Brita Esperantisto

Novembro-Decembro 1986

## Vino ESPERANTO

Wine

VINO DE ANGLUJO

ENGLISH TABLE WINE

70cl



Produce  
of the UK

Speciale elektita kaj enboteligita okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto, 1987, el vinberoj kultivitaj en Anglujo.

Specially selected and bottled to mark the Centenary of Esperanto, 1987, from grapes grown at St Georges Vineyard, Waldron, East Sussex.

La

# Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

82A Jaro, N-Ro 8 73

Novembro-Decembero 1986

**Eldonas:**

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON  
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

**Redaktoro:**

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aligû en iu ajn monato – estas £11.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn ‘Esperanto News’ kaj ‘La Brita Esperantisto’. Abono nur al “La Brita Esperantisto” estas £5.50 jare sen aneco. Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, ‘intensive’ kaj Altrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

## *Form of Bequest*

I ..... give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

## GRAVA AFERO POR ESPERANTISTOJ

Andrew Large, *The Artificial Language Movement*, Oxford, Blackwell 1985. 240 pĝ Bindita, £19.50

Ĉi tiu verko okazigis interesan reason en la Esperanto-movado, almenaŭ en Britio. Antaŭ ol ĝi aperis, oni supozis ke ĝi celis kondamni Esperanton kiel malsukceson. Tamen post ĝia apero, estas evidente, ke tiu juĝo pri la libro ne estas prava. La aŭtoro ne indikas entuziasman apogon por Esperanto, sed certe ne kondamnas ĝin. Estas vere, ke en unu loko li komentas pri alia projekto, *Glosa* rilate kun Esperanto "it is hard to imagine how such a language might prove successful where a relatively well-organised and long-standing movement like Esperanto has hitherto failed". (pĝ 160). Nur tiuloke li mencias malsukceson rilate al Esperanto, kaj temas nur pri ĝisnuna malsukceso. Li ne indikas aprobon de tiu ĝisnuna malsukceso.

La verko estas skribita de eksterulo de la movado, docento de bibliotekista kolegio, li jam verkis pri lingvaj problemoj en scienca eldonado, en sia antaŭa libro *The Foreign Language Barrier* (London, Deutsch 1983) Parto de la materialo en la nuna verko ankaŭ troviĝas en la antaŭa.

En la unua parto de la nuna verko, estas diskutado de la historio de provoj de solvo de la lingva problemo antaŭ Esperanto. Ĝi estas utila sintezo de materialo pri tiu problemo, pri eblaj solvoj, kaj pri la ĝenerala historia ĉirkaŭaĵo. En la fino de la unua parto estas diskuto pri Volapük kaj pri la frua historio de Esperanto.

La aŭtoro akceptas la fakton ke Esperanto, kiel vivanta kaj uzata lingvo, estas en tute alia kategorio ol la aliaj projektoj, kiuj havas nenian aŭ nur minimuman komunumon de parolantoj. Pro tio lia diskuto pri Esperanto estas multe pli detala ol tiu de la aliaj

proponoj. Sekvas klara prezento de la gramatikaj aspektoj de Esperanto. Tute mankas la supraĵaj aŭ neinformitaj kritikajoj de la lingvaj detaloj, kiuj abundas en multaj aliaj studoj de la lingvo fare de eksteruloj. Estas ankaŭ informo pri la nuntempa historio de la Esperanto-movado kaj pri ĝia etoso – grandparte ĉerpita el mia propra libro *The Esperanto Movement*. Sekvas serioza ekzameno de kritikajoj de Esperanto de diversaj vidpunktoj. Unue la aŭtoro konsideras kritikojn de lingvaj detaloj, sed li saĝe konkludas "Whatever its linguistic defects, Esperanto has by now proved that it is quite capable of functioning effectively in the many ways expected of an international language; in any case, the success or failure of any constructed language ultimately is unlikely to be determined primarily on linguistic issues". En la lasta ĉapitro li konsideras ankaŭ ĝeneralajn kritikojn de artefaritaj lingvoj, ekzemple la argumenton, ke universala lingvo supozas komunan percepton de la mondo. Li notas la aposterioran respondon de la apogantoj de artefaritaj lingvoj, nome ke en la praktiko ili bone funkcias. Ŝajne li akceptas tiun starpunkton, sed ne konsideras la aferon detale. Se la aŭtoro havus pli vastan scion pri la lingvo kaj la movado, li estus provinta pli profunde pritrakti tiun demandon kaj la esperantistan respondon; sed mankas en la libro diskuto pri la debatoj kiuj okazis pri la nuancoj de diversaj vortoj; pri la aŭtoritato de la Akademio; kaj pri la akcepto en la praktiko de la du tutesperantaj vortaroj de SAT kiel normigaj.

La aŭtoro ne proponas klaran solvon de la lingva problemo. Li simpatie konsideras la valoron de Esperanto; sed ankaŭ li atentigas pri la malfacileco kiu restas: konvinko de la ekstera popolo pri la taŭgeco de Esperanto. Sen universala lingvo, li notas ke lingvaj prob-

lemoj ankoraŭ daŭras; li ripetas la konkludon de sia antaŭa verko, ke en scienca kaj alia komunikado la lingva estas grandega problemo. Sed kiel alternativo al artefarita lingvo, li rimarkas, oni povas proponi nacian lingvon por tutmonda interkomprenilo: kaj en la nuntempo preskaŭ ĉiam tiu lingvo proponita estas la angla. Li konsideras la argumenton, ke en la praktiko la angla fariĝos aŭ jam fariĝis la internacia lingvo. Large argumentas, ke la angla plialproksimiĝas al tiu pozicio ol aliaj konkurantoj; tamen li avertas ke povas ekzisti gravaj kontraŭaj fortoj, precipe pro la rilato inter la angla kaj usona kaj brita politiko. Sed li notas ke por sciencaj celoj la rolo de la angla ankoraŭ kreskas, eĉ nun en francelingvaj medioj. Li avertas tamen ke oni povas troigi la internaciecon de la angla, kaj ke la kompetenteco de multaj neangla-lingvanoj pri tiu lingvo ofte estas tre malbona, kaj sekve ili suferas de serioza malavantaĝo.

Resume, oni certe ne povas argumenti, ke tiu libro enhavas neinformitajn kritikadojn de Esperanto, aŭ ke ĝi diras ke Esperanto estas malsukcesa afero. Saĝe la aŭtoro ne antaŭdiras la estontecon. Tamen restas kelkaj kritikendaĵoj, pri la verko ĝenerale. Unue, estas bedaŭrinde ke, kvankam la aŭtoro bone komprenas la bazan strukturon de Esperanto, li evidente ne scipovas uzi la lingvon el la praktiko, eĉ por legado. Pro tiu fakto, aperas nur tre malmultaj esperantaj libroj en lia bibliografio.

Ankaŭ li citas mian propran libron rilate faktojn diversajn kiuj ne estas originalaj eltrovaĵoj miaflankaj: nur okazas ke mi pridiskutis ilin en la angla. Ankaŭ la aŭtoro supozas, ke mi tradukis la 16 regulojn kiuj estas represitaj de li; sed temas nur pri la anglalingva sekcio de la *Fundamento*. Due, kvankam li ne ege troigas la aferon, restas la impreso ke li iom emfazas la disvastiĝon de la angla pli multe ol la faktoj pravigas. Ekzemple, li mencias ke multaj konataj vojaĝemuloj, ekzemple sportistoj, povas uzi pli multe ol antaŭe la anglan en internaciaj kunvenoj. Bone, sed li ne tuŝas la demandojn pri kompetenteco en duaj lingvoj krom la angla, kaj la lingvaj problemoj en la Eŭropa Ekonomia Komunumo ne estas sufiĉe traktataj.

Konklude, mi tutkore bonvenigas tiun verkon, kaj mi bedaŭras ke iuj Esperantistoj havis antaŭjuĝojn pri ĝi eĉ sen legi ĝin. Estas tre grava afero por Esperantistoj se esploro okazas pri lingvaj problemoj nuntempaj. Dum longa tempo tia esploro mankis: ekzistas utila studo de Shenton *Cosmopolitan Conversation* (1933) kiu bedaŭrinde neniam estis ĝisdatigita. Esperantistoj povas bedaŭri verkojn pri la lingva problemo nur se ili ripetas stultajn misinformojn pri Esperanto. Pri tio oni ne povas akuzi Large; ke tia verko estas havebla en la angla, do legebla de eksteruloj de la esperanta movado, ni povas nur esti feliĉaj.

Peter G. Forster

### Naiva Muso

Subtegmentejon iris mus'  
Tre juna, sen la sperto.  
Surloke renkontiĝis ĝi,  
Imagu, kun vesperito.  
Ektremis surprizita mus'  
Kaj, reveninte kelon,  
Ravita flustris al patrin',  
"Mi vidis ĵus anĝelon!"

Ludmilla Jevsejeva

### The Simple Mouse

Under the roof a little mouse  
Was running pit-a-pat,  
And suddenly there met with him –  
Imagine it – a bat.  
Startled, he scuttered home again,  
Trembling in every limb.  
"Mother," he breathed in ecstasy,  
"I've seen the seraphim!"

trad. Katelina Halo

## Ĉiutaga Esperanto

## LA MURDINTOJ DE LA STEPO (THE MOORS MURDERERS)

(Senfina Debato)

“Paĉjo, ĉu vi legis en la ĵurnalo ion pri la ebla ellaso (*release*) de Majra Hindli, post pli ol dudek jaroj en la malliberejo? Kiel infano vi loĝis en la sama kvartalo kiel ŝi, ĉu ne?”

“Bonŝance estis por ŝi, ke oni nuligis la mortpunon (*death penalty*) ĵus antaŭ ŝia proceso. Kiam ŝi murdis, pendumado ankaraŭ validis (*was in force*). Mi dubas ĉu la publiko iam akceptos ŝian ellason – malgraŭ la strebego por tion efektiviĝi (*bring it about*) fare de tiuj, kiuj kredas, ke ŝi reformiĝis.”

“Ĉu tion vi kredas?”

“Ke ŝi reformiĝis? Mi ne scias, kaj estas al mi tute indiferece, ĉu aŭ ne (*I don't care in the least whether she has done or not*). Ŝi kaj tiu Ian Brejdi turmentis kaj mortigis almenaŭ tri infanojn, simple por sin amuzi. Laŭ mi, la pendumo estus tro bona puno por tia kanajlo. Vi ne naskiĝis tiam, kaj do ne memoras la proceson. La ĵurnalistoj de la tuta monda venis por ĝin priraporti.”

“Mi tamen legis pri la afero. Laŭ la tribunalo (*court*) ŝi kunmurdis du, estante nur komplico (*accessory*) post la murdo de la unua infano el la tri.”

“Tri aŭ du – ĉu tio vere gravas? Ŝi estis kruela diablino. Kial ĉikani pri la detaletoj?”

“Pardonu! Kompreneble la sento de la publiko tiam estis de ŝoko kaj hororo. Sed ĉu ne estas vere, ke la publiko iom hipokrite agas, ĉar ĝenerale la homoj ŝatas murdoprocesojn, kaj vampire (*ghoulishly*) legas la plej hororigajn detalojn, matenmanĝante siajn maizflokojn (*cornflakes*)?”

“Homojn kiaj vi mi neniam komprenos. Verŝajne, laŭ vi same fie estas interesiĝi pri la murdo kiel ĝin fari. Sed estas granda diferenco inter la intereso kaj la faro. Sendube bankkomizoj (*bank clerks*) ĝuas filmojn pri bankra-

bistoj, sed tio ne implicas (*mean*), ke ili intencas krimi kontraŭ siaj dungintoj, ĉu?”

“Ha ne! Vi min tute misprezentas. Kiel vi ja bone scias, mi kontraŭas principe la mortpunon, kaj ankaŭ kredas, ke se iu efektive reformiĝis, kaj pentis pri la misfaroj, tiu estu tuj ellasita, ĉar la celo de la enkarcerigo estas reformi, ĉu ne?”

“Kaj kiel oni povus scii, ĉu iu reformiĝis? Ĉiu kapelo en ĉiu malliberejo en la lando estus plenpakita de memnomitaj ‘reformiĝintoj’ – la pastroj ne povus regi la situacion (*cope*). Vi estas naŭva revemulo, se vi ne povas tion kompreni!”

“Sed barbare estas, ĉu ne? forŝlosi la homojn dum pli ol dudeko da jaroj, kaj eĉ pli barbare estas ilin mortigi. La mortigo estas la mortigo – estas indiferece (*it doesn't matter*) kiel oni volas ĝin nomi: mortigo, murdo, ekzekuto, ekstermo, gentomurdo (*genocide*), aŭ alie.”

“Vi forgesas unu elementan fakton: la homoj ĝenerale restas barbaraj, kaj multe pli bone estas, se la ŝtataj oficistoj, post profesia enketo kaj justa proceso, aljuĝas la punon. Alie ni havus bandojn de memnomitaj (*self-appointed*) venĝistoj, kiuj vagadus sur la stratoj, kaj linĉus (*lynch*) senkulpuojn. Multe pli bone estas pendumi iun en la malliberejo ol tiun senprocese pendumi de stratlanterno. Tiu ‘barbara sistemo’, kontraŭ kiu vi protestas, estas procedo por civilizati la barbarojn.”

“Sed ĝuste tiajn argumentojn oni uzis kiam oni pendumis la satantajn homojn pro ŝtelado de unu ŝafo, aŭ vipegis eĉ infanojn pro bagatelajo.”

“Sed la homoj pli civilizatiĝis, kaj la punoj iĝis ĉiam pli mildaj. Tiu Majra Hindli havas karceron (*prison cell*) kun

tapiŝo, televidilo, bildoj sur la muro, floroj – vi nomu ĝin, ŝi jam havas ĝin! Sole unu afero mankas, la libero. Kaj se tiun ŝi gajnus, la parencoj de la murditaj infanoj sendube ŝin persekutus (*pursue*) kaj mortigus. Du homoj jam minacis tion fari. Kaj se tion ili farus, la jura maŝinaro devus ilin preni, kaj juĝi, kaj kondamni al la malliberejo. La tuta lando protestus, se tio okazus. Tiuj kompatindaj parencoj terure suferis, funebrante (*mourning*) dum pli ol dudek jaroj siajn perditojn.

“Do, vi lasus ŝin en la malliberejo, por ke la parencoj ne mem troviĝu antaŭ la tribunalo, ĉu?”

“Absolute! Kaj kiam vi iĝos patro, sendube vi same sentos.”

“Sed se ni daŭre agos tiel, ni restos ĉiam barbaraj. Kiel efikas (*what use is it*) ripeti, ke ni amu unu al alian, kaj samtempe jure venĝi?”

“Viajn sentojn mi admiras, sed krom se vi rekonos (*acknowledge*), ke nur malgranda procento de la homoj pensas kiel vi, vi vere ne frontos la barbarecon de la mondo, en kiu vi loĝas. Do, faru laŭeble por plibonigi la mondon, sed evitu banalajn kaj superecajn juĝojn.”

“Paĉjo, se vi pravus, ĉiu reformulo en la mondo estus perdinta sian tempon. Dank’ al Dio, ke pluraj granduloj en la mondo klopodegis por ĝin reformi!”

“Kaj, ĝenerale, ili perdis la vivon tiel agante. Nu, ni iom vagis for de la temo. Dupartigo (*dichotomy*) ekzistas tra la mondo. La homoj de la nuna epoko trovas multe pli facile pensi kaj paroli pri la universala amo ol ĝin praktiki. Praktimumoj havas grandan inercion (*inertia*). Mi simple konsilas, ke dum vi filozofie pensas, vi frontu la faktojn de la ĝisnuna homa naturo.”

“Sed, Paĉjo, ni devas *iel* kuraci la homan naturon.”

“La kuracisto devas fronti la malsanon antaŭ ol li povas ĝin kuraci. Pri (*as for*) Majra Hindli, car mi ne scias ĉu aŭ ĉu ne ŝi reformiĝis, mi ne devas solvi la problemon, ĉu bone estus ŝin ellasi aŭ ne. Sed se vere ŝin kaptis la religio, ŝi

taksu sin monaĥino kaj dumvive tiel pentopagi (*expiate*) tiujn fikrimojn! Ŝi ne bezonas korpan liberon por adori Dion.”

“Paĉjo, vi estas vere malmolkora homo!”

“Eble, sed mi certe ne estas tiel malmolkora kiel tiuj du.”

**Don Lord**

## Saxon chaps

The English . . . are a bluff people. They are a light, fair, and cleanly lot, and are convinced that the peoples of the dark lands are the buggers who are causing all the trouble. This makes them even more insufferable. I will tell you the worst of it. Only a stupid people could think their language universal.

This very week before you will be getting it across the cathode ray tube – a Scot of course invented it – and you will be asked to accede to the cultural superiority of the very way these Saxon chaps speak. Listen to this: “The English language is the first language in the world. It is the language of business and diplomacy. (My old chum, Godfrey Smith, who penned the foregoing drivel, is wrong there. The lingua franca of diplomacy is of course French). “It has the richest literature and is the greatest treasury of fiction, poetry, and drama . . . it is as earthy as it is elegant, as randy as it is fastidious.”

It is as self-important, I should say, as those whose mother tongue it purports to be. Godfrey comes out with another English cracker. The English author, he says, “takes it as a matter of course that the world speaks English.” What else would it speak?” he says rhetorically.

**Jack Mclean**, “Glasgow Herald”, 19.9.86

I never met one English-speaking tourist in the whole of Moscow.

**Hunter Davies**, “Punch”

Robert Burns

## ALPAROLO AL LA PARADE PIEMAJ

Vi, kiuj pompe virtas mem,  
 Piaĉa sanktularo,  
 Vi zorge notas kun klaĉem'  
 La pekojn de l' najbaro!  
 Se vivo muelile riĉas  
 Kaj multa akvo fluas,  
 La plena trogo malpleniĝas  
 Sed plu la klapo bruas.  
 Aŭskultu min, virtulkohorto,  
 La homojn advokati  
 Pasantajn preter Saĝopordo  
 Por ĉe Folec' restadi:  
 Pri ties kulpoj kaj eraroj  
 Mi venas al defendo:  
 La stultaj trukoj kaj misfaroj,  
 Missorto kaj dependo.  
 Vin mem kun ili komparinte,  
 Vi pro l' komparo naŭzas,  
 Sed pensu jenon estas inde:  
 Kio malsamon kaŭzas?  
 Ignoru donojn de l' bonŝanco:  
 Orgojla virtocerto,  
 kaj (ja pli grava vivinstanco)  
 Pli vigla kaŝolerto.  
 Pensu, se via puls' bridita  
 Kelkfoje tikas salte,  
 Kiel tra vejn' pasie spita  
 Galopas sang' senhalte:  
 Se vent' kaj tajdo malantaŭas,  
 Senĝene vi vojaĝas,  
 Sed se ilia fort' kontraŭas  
 Veladon ĝi domaĝas.  
 Kunem' kaj Gajo araniĝas  
 En ĝojo, sen dilemo,  
 Ĝis ili pro la sorĉ' ŝangiĝas  
 Diboĉo kaj Drinkemo:  
 Se saĝe ili nur kalkulus  
 Pri la eterna posto,  
 Pri via fiinfer' skrupulus,  
 Kaj damnon al la kosto!  
 Vi ekzaltitaj virtaj damoj  
 En pia laĉarango,  
 Antaŭ ol draŝi per defamoj  
 Pensu pri interŝango:  
 Amata knabo, taŭga ĉelo,  
 Perfida em' apogas –

Sed lasu flustri al l'orelo:  
 Vi eble ne tre logas.  
 Do mildu gvato al homfrato,  
 Kaj al fratinoj krome:  
 Se emas oni ekmalboni,  
 Erari estas home:  
 Ja nur mallume vi komprenas  
*Kialon* de la tento:  
 Kaj same lame vi divenas  
 Kiomon de la pento.  
 Nin nepre rajtas juĝi sole  
 Supera korkreanto:  
 Akordojn konas Li kontrole,  
 Kadenccon de la kanto:  
 Do mutu ni bilancrigarde,  
 Senpovaj pri l' konsisto:  
 La *faron* ni konstatas parte,  
 Ne scias pri l' *rezisto*.

Trad. W. Auld

## LA SKOTA AŬTUNA SEMAJNFINO

La jara "studrondo" okazis 12-14 sept., kiel kutime en la tre taŭga konferenc-centro Churches' House, Dunblane, kun pli ol 30 partoprenantoj.

Okazis diversgradaj kursoj por lernantoj, kaj por la progresintoj diskutoj kaj prelegoj. Distraĵoj kaj ekskurso estis por ĉiuj. Albert Goodheir prelegis pri Ossian: William Auld pri la graveco de "Kvaropo", kaj Mia Casey pri aktuala ekologia temo, kiun ŝi nomis "Perdita paradizo". Per vortoj kaj lum-bildoj ŝi elmontris la malbonan efikon de grandskala detruado de arbaroj.

La tre plena programo inkluzivis raportojn pri la U.K. en Pekino de Annie Lawson, de la hispana kongreso de Hugh Reid, dum la festvespero tri skeĉojn kaj dancadon, paroladon de Anne Eure pri Sardinio, posttagmezan ekskurson al la bela Trossachs-regiono en somereca vetero, ekumenan diservon gvidatan de David Bisset. Laŭ ĉies voĉo, la ĉijara studrondo estis sukcesa aranĝo, pro kiu ni devas danki Albert kaj Phyllis Goodheir.

Gis la venonta, 25-27 Sept. 1987.

Tom Neil

## LAŬ MIA OPINIO . . .

### HELPO

Legantoj de la septembro-oktobro numero de L.B.E. eble vidis la peton de la franca E-Grupo de Chambéry por gratuletoj okaze de la inaŭguro de la "Square Docteur Zamenhof" en ilia urbo.

S-ro. Raymond Boré ĵus informis min, ke ĝis la 22-an de septembro li ricevis 74 leterojn el 25 landoj – kies 3 el Britio. Ŝajnas al mi, ke ni povas fari pli bonan ol tio por subteni niajn francajn gesamideanojn!

La grupo nun ekscias, ke la inaŭguro okazos la venontan printempon por koincidigi ĝin kun la jubileo de Esperanto. Tamen, ne necesas atendi por sendi viajn leterojn.

Denove, mi petas, skribu, aŭ proprone aŭ nome de via E-Grupo, gratuleton al la urbestro de Chambéry pro la decido honori Zamenhof tiamaniere. La adreso estas:

URBKONSILIO DE CHAMBERY

pere de Raymond Boré,

481, rue du Bertillet,

F-73000 CHAMBERY,

Francio.

Mi opinias, ke ni devus preni ĉiun okazon por montri solidarecon al niaj gesamideanoj ĉie. Ĉu ne?

**Sandra Slade**

### Ino sen fino

Denove mi ŝuldas dankon al nia amiko Reto Rossetti, kies letero sendis

min al relego de la teorioj de Kalocsay (ĉiam plezuriga entrepreno).

Laŭ "Plena Analiza Gramatiko":

"Nur en la poezio oni povas renkonti la evitindajn formojn belino, karino".

Tamen, ni memoru, ke Kalocsay kaj Waringhien (prave) analizis la ĝistiaman uzadon, dum mi spekulaciis pri evoluo de viva (do evoluiganta) lingvo. Kuraĝite de la opinio de Reto, ke la formo "estas uzebla kaj punkto", mi ne hezitas estonte diri "Esperantistinoj estas klerinoj".

Mi ne opinias, ke tio ĝenas la lingvosenton aŭ konflikte kun la akceptita analizo de la vortkunmeto, ĝi nur ŝoketas pro nekutimo. Laŭ PAG la vorto "belino" analizigis kiel "belo ino". Tamen oni ankaŭ povus analizi ĝin kiel "ino karakterizita je belo", aŭ eĉ klasigi "-in-" kiel veran sufikson anstataŭ sufiksoido. Saussure, la patro de nia vortanalizo, ne hezitis uzi "in" senpere post adjektiva radiko.

Se tia uzado iĝos pli ofta, oni ne konsideros "bonulinon" erara formo, sed pleonasma, kiel ekzemple ni nun konsiderus "konatulinon".

**Rik Dalton**

En "Bulteno de Esperantista Literatura Asocio". Novembro 1912, oni starigis enan demandon: "Ĉu oni povas ellasi la 'ul' en la formoj virinseksaj? Ekz. 'babilemino? amindino?' Ĉu oni povas diri 'karino'?" Verŝajne nur unu asocio sentis emon respondi, iu S.M. Lia respondo estis konciza, se ne tute definitiva. Jen ĝi: "Ne".

**W. Auld**



IAHE – Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj estas eĥo de la bezonoj de invalidaj esperantistoj kie ili kun siaj fortoj kaj kapabloj, kune kun aliaj, aktive partoprenas en la solvado de siaj pluroblaj problemoj kaj problemoj de la monda komunikado pere de internacia Lingvo – Esperanto.

Aliĝilojn sendas kaj helpon akceptas  
INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ. Skolska ul. 25. YU-56227 Borovo, Jugoslavio.



## TRADUK-KONKURSO

*Ni invitas la legantojn traduki la suban tekston en la anglan lingvon. Ĝi estas ĉerpita el la libro "En Ĉinio batalanta" de Hasegawa Teru, presita ankaŭ en la volumo "Verkoj de Verda Majo". Temas pri japanino, kiu edziniĝis al ĉino kaj lin akompanis al lia hejmlando, en epoko, kiam la du landoj militis. Ilia komuna lingvo, kompreneble, estis Esperanto. Libropremio(j)n ricevos la plej bona(j) traduko(j), laŭ prijuĝo de la redaktoro. Limdato: la 19an de januaro 1987.*

\*

Same kiel antaŭ 8 monatoj, la ondoj denove lulas min maltrankvile, forlulas min al nekonata loko, al nebula estonto

Nia lito tuj frontas la eksteron nur pere de l' muro, kaj mi sentas ke la ondoj pli kaj pli altiĝas. Mi eksidas, esperante ke tio donu al mi ioman komforton. Vane. Ree mi kuŝiĝas, turnas min. Nenio helpas. La ŝipo jen suriras monton de ondo, kaj la sekvan momenton abrupte falas en la fundon de la valo. Tio ne estas simpla suprenmalsupreniro. Ĝin partoprenas ankaŭ skuo dekstren-maldekstrena. Ĉe ĉiu balanco-skua korpo ruliĝas, la koro kunpremiĝas. Ĉiuj nervoj en la cerbo kvazaŭ estas krevontaj. Sensignifaj penseroj aperas-malaperas senorde. Fragmentoj de nekomprenebla ĉina lingvo parolata de la samĉambroj malagrabla preterpasas miajn orelojn. Nenion mi volas. Absolute nenion. Dormi – nur dormi se eblus. Antaŭ la fermitaj okuloj, sennombraj etaj kvazaŭpunktoj de nigr-blua koloro akvokirle turniĝas, forfluas, turniĝas, forfluas.

Najbare de ni troviĝas deko da studentoj el Ŝanhaja Universitato. Laŭ ilia diro, ili veturas al Hongkong por daŭrigi la studadon interrompitan pro la milito. La junuloj, kiuj iras de unu al alia nepatria terpeco, senĉese manĝas, kantas, babilas, ridas. Ankaŭ L bone

parolas kun ili, Mi ne komprenas kial ili povas sinteni tiel gaje kaj senĝene sur tiu ĉi diabla hamako. Al mi ŝajnas ke ili estas homoj el alia planedo.

Fariĝas al mi ĉiam pli neelporteble. Estas nenia distraĵo. Ĉiujn librojn ni metis ĉe l' amikoj de alia kajuto, ĉar de kiu flanko venu cenzuro, por ni estas sekure sen tiaj objektoj. Kaj eĉ se mi kunhavas libron, terura balanco, sufoka aero kaj duonluma lampo detenas min de legado. L diras ke mi ne pensu pri la ondoj, plej bone se mi parolu por forgesi ilin. Tamen kion kaj en kia lingvo? Mi ne speciale pensas pri la ondoj, sed tuj ekstere ili batas la ŝipflankon, kaj tiu eligas malagrablan metalecan knaron. Aldone mia tuta korpo ruliĝas tiel ke en ĝi ribelas ĉio. Mi min turnas al la muro malluma kaj malpura, firme kaptas la randon de la lito. Ĉio for! Estu nenio, absolute nenio! La kapo doloras vome kaj pulse.

La tempo rampas tre malrapide, kiel se ĝi ne volas antaŭen. La lampo duonlumas mucide kaj morne, de la mateno ĝis la nokto. Same, kvazaŭ eterne same. Enuo kaj inerto nestas en mi kaj mi ne havas rezistoforton kontraŭ ili. Foje-foje la abrupta iro de onda monto al valo donas al mi abnorman ĝuon, sed jam je la dua momento ĝi denove estas infera torturo kiu senĉese mordas kaj ĉifas min.

De l' noktomezo la balanc-skua fariĝas neesprimeble furioza. Samĉambroj ĉiuj dormas. Iuj eĉ ronkante. Ekstere io fajfas kaj muĝas. Ĉu uragano?

### SENPAĜA KONGRESA NUMERO

Se vi deziras senpage ricevi raporton pri la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, bonvolu peti ekzempleron de la speciala 8-paĝa kongresa numero de "Heroldo de Esperanto" ĉe la redakcio/administracio:

*"Heroldo de Esperanto", A. Fighiera-Sikorska*

*c/I. Ramon Jimenez 28, 6<sup>o</sup>A  
E-28036 MADRID, Hispanio*

## RAPORTO PRI LA 71A UK

de Tracy Taylor, gajninto de la Nojefa Nancie Durham Premio (£1000)

*Scenejo: la plej granda kongreso kiu iam ajn okazis en Ĉinio.*

*Partoprenantoj: pli ol 300 entuziasmaj ĉinoj kaj preskaŭ 2000 ekscititaj eksterlandanoj.*

Jes! Spektaklo estis la 71a Universala Esperanto Kongreso en Pekino, kaj ĝi estis speciala pro pluraj kialoj. Ĝi estis la unua internacia Esperanto-kongreso en Ĉinio, do la unua ŝanco por la plej multaj ordinaraĵoj ĉinaj esperantistoj renkonti eksterlandanojn de aliaj kontinentoj. Ĝi estis ankaŭ grava okazo por la ĉina registraro montri sian grandan deziron komuniki kun aliaj landoj.

(1) por lerni kiel modernigi sian propran landon

(2) por kune strebi por internacia paco

(3) por plenumi sian respondecon (kiel la lando plej loĝata en la mondo) pri la sorto kaj la evoluo de la homaro.

Tial ĉeestis la solenan inaŭguron, dimanĉon, pluraj membroj de ĉinaj superaj instancoj, kiuj formis la honoran komitaton. Inter aliaj, Huang Hua (vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso) parolis al ni, iomete Esperante, pri la kongresa temo (interkompreniĝo, paco, evoluo) kaj kiel ĝi konformas al la politiko de la ĉina registraro. La Esperanto-movado en Ĉinio ŝajnas ege grava kaj populara afero!

Dimanĉo estis ankaŭ la tago de la kongresa balo ĉe la Internacia Klubo de Pekino. Ĝi estis sufiĉe stranga afero, ĉar oni devis danci kiel dum la 1930aj jaroj – la ĉinoj ne progresis ĝis la moderna diskoklubo!

Kaj ne forgesu sabaton! Matene kaj posttagmeze okazis kurso nomita "La Ĉina eksprese", kie ni lernis kelkajn utilajn esprimojn kaj la bazojn de la gramatiko. Diru "nǐ hǎo" (Saluton!) al ĉino kaj vidu lian grandan rideton! Pli malfrue ni vidis mirindajn prezentaĵojn

dum la folkloraj vespero, ekzemple akrobataĵon, dancon, kantadon, kunludon de ĉinaj naciaj muzikiloj kaj laste Pekinan Operon. Mallonge, interesa rigardo al la ĉinaj naciaj artoj!

London mi ĉeestis paroladon kaj filmon pri "Oomoto", kiu komence ŝajnis esti japana metodo de malstreĉeco, aŭ io pri japanaj tradiciaj artoj, sed fine mi komprenis ke ĝi estas religio. Vespere mi ankaŭ lernis iom pri Japanujo dum la teatraĵo "Virino, kiu flustris en uragano", kiu estis moderne prezentita sen scenariujoj, kaj kun unu sola aktorino tute nigrevestita. La teatraĵo temis pri Verda Majo, japana esperantistino kiu vivis dek jarojn en Ĉinio, kie ŝi bataladis por la liberigo de la popolo kaj por amikeco inter ŝia lando kaj Ĉinio.

Mardon mi faris ekskurson al la Imperia Palaco en Pekino – grandega kaj belega loko antaŭe rezervita por la imperiestro kaj liaj proksimume 70 konkubinoj! Mi ankaŭ vizitis "Tiananmen Placo" – la plej grandan placon en la mondo.

Merkredo estis la tago de la granda kongresa ekskurso por ĉiuj partoprenantoj. Do, ekde la sepa al la Granda Muro! – la sola home farita konstruaĵo videbla de la luno. Kaj ĝi vere estas kolosa belajo. Vespere okazis la junulara vespero kun dancantoj el diversaj landoj. Sed kian ajn muzikon ni aŭskultis, la ĉinoj ĉiam dancis sammaniere!

Aliaj menciindaj okazaĵoj inkluzivas la koncerton de Joëlle Rabu, fama kanada kantistino, kiu eĉ kantigis la aŭskultantaron angle kaj france per fonetika metodo! Ĉu vi konas la kantojn "O Sonzelizej" aŭ "Tru lav"? Mi ankaŭ devas fari mencion de la vizito al la Somera Palaco – bela somerejo por la imperiestroj, kun granda lago, kaj ŝipo el marmoro speciale konstruita por la imperiestrino.

Kompreneble mia Esperanto-kapablo pliboniĝis dum la semajno, sed strange tio kio helpis min la plej multe estis eksterkongresa evento – fakte, vespera ludo de "Konsekvencoj" kun

esperantistaj geamikoj kaj, kompreneble, tute Esperante!

La plej memorinda okazaĵo estis la bankedo en la popola halo, al kiu Huang Hua invitis grupon de eksterlandaj esperantistoj. Ni manĝis ĉian ŝorton de strangaj manĝaĵoj, ekzemple maralgon kaj fungon. Tio vere streĉigis mian Esperanto-vortprovizon! Sed la bankedo estis grava afero por la esperantistoj, ĉar ĝi montris la pozitivan sintenon de la ĉina registaro al nia lingvo.

Multajn sincerkorajn dankojn por havigi al mi la ŝancon ĉeesti la 71an UK-on en Pekino! Ĝi estis vere ĝuinda kaj eduka kongreso por mi.

## LA KANCERKLINIKO ESTAS DEK-JARA

Kvankam daŭre politika, kultura, skandalema, ajnista, pli ol 150 fam- aŭ baldaŭ famkonataj verkistoj kontribuis al la sukceso de tiu sendependa revuo.

Duc-Goninaz, W. Auld, R. Corsetti, Z. Heide, D. Lister, R. de Jong, K. Long, P. Thorsen, Lorjak, A. Brennan, B. Ragnarsson, R. Rossetti, C.R.L. Power, G. Cappa, N. Saletti, A. de Giorgi, Lo Jacomo, JP Danvy, B. Golden (ĉu?), LG. Nordenstorm, W. Zelazny, C. Nourmont, T. Tyblewski, R. Casch, A. Cherpillod, G. Lagrange, I. Nagy, H. Gonin, S. Sire . . . estas ja famkonataj.

LL da Silva (Brazilo), A. Sidworke (Britio), S. Hideg kaj I. Ertl (Hungario), Benito (FRG), J. Exmann (Nederlando), JL. Azra (Francio), Jozo (Jugoslavio), H. Ashe (Usono) . . . estas nomoj, kiujn vi baldaŭ ĉiuj konos kaj aprecos.

La n-ro 40 -okt/nov/dec- (+ la "KROM" kun "La Stilekzercoj" de R. Queneau entute tradukitaj de I.ERTL.) ampleksos 90 paĝojn.

Daŭre kundirektoras Ĵak LE PUIL/LAŬRENCO SEPTIER

Abono por 5 sinsekvaj n-ro: 80 FF al Le Puil, pĉk Paris 12 729 73 X aŭ UEA Klik-g.

## VETERANA ESPERANTISTA KLUBO

La Jarkunveno de V.E.K. en Pekino, 27.7.86, bone sukcesis. Kiam nia Sekr., S-ino Julie Winter kaj S-ino Hiebet atingis la salonon, ili estis surprizataj trovi ke ĉiuj seĝoj estis okupataj kaj 60 VEK-anoj atendis ilin.

S-ro Zensto rakontis pri la pasinteco de la Ĉina Esperanto-movado, kaj Prof. Sida, vic-prezidanto de la Pekina Veterana Esperantista Klubo, rakontis pri la novfondita klubo. D-ro Tosihide Kuwahara (Japanujo) kaj D-ro Fenyvesi (Hungarujo) ankaŭ ĉeestis la kunvenon.

La Jar-raporto montris, ke sume VEK nun havas 1588 membrojn en 39 landoj:—

Lernis Esperanton antaŭ pli ol 80 jaroj	10
Lernis Esperanton antaŭ pli ol 70 jaroj	129
Lernis Esperanton antaŭ pli ol 60 jaroj	462
Lernis Esperanton antaŭ pli ol 50 jaroj	708

Do estas nun 1309 Jubileanoj, plus 279 Veteranoj (pli ol 40 jaroj) = 1588.

Eble vi opinios, ke tio ne estas granda sumo post ekzisto de pli ol 20 jaroj: sed vi devas memori, ke temas pri la pli aĝaj Esperantistoj, kaj dum la pasinta jaro ni perdis pro morto, 50 anojn, inter ili tiel bone konatoj nomoj kiel Mag. Isaj Dratwer, D-ro Vilho Setälä, Mark Starr, Teo Jung kaj Ethel Lewin, la vidvino de la VEK- fondinto.

Dank' al la respondo de la Britaj Esperantistoj, ni nun havas 91 membrojn en Britio, kiu metas nin en la tria monda pozicio kune kun Japanujo. Je la supro de la llisto staras Bulgarujo (491). Certe ni ne povos atingi ĉi tiun pozicion, sed eble ni povos pasi Sovetunion (115) en la dua loko. Ni kapablas fari tion — ĉu vi helpos?

Fina vorto:— Laŭ raporto, en Litovio nun vivas Esperantistino, kiu havas 130-jarojn!!

Ankoraŭfoje — Veteranoj — VEK-iĝu!

**Jack Heath**  
Brit. Rep. VEK.

## ESPERANTO EN ĴURNALO

En "Evening Sentinel" (Stoke-on-Trent) la 13an de septembro aperis jena alineo:

Salutojn or Cheers! today is Esperanto Day and speakers of the international synthetic language are preparing for its centenary next year. Eight million people worldwide and 10,000 in Britain, speak the tongue.

La 22an de septembro la ĵurnalo aperigis jenan leteron *en Esperanto*:

Estimata Sinjoro Redaktoro.

Pardonu min – en la sentinelo de la 13a de septembro estis eraro. Ne estas 'salutojn'; en Esperanto estas 'Saluton'.

Sincere via, D-ro Paul Gubbins.

## POST 20 JARCENTOJ . . .

Filmo kun tiu titolo ekzistas en ĉiu oficiala lingvo de la Eŭropa Komunumo, kaj nun ankaŭ en Esperanto. La filmo daŭras 30 minutojn, kaj estas havebla en 16mm film-versio (sistemo: son-bildoj, la plej uzata film-prezentado profesia); se oni preferas montri la filmon per televid-aparato, haveblas ankaŭ vid-benda versio – sed tiukaze oni devas indiki la sistemon (VHS, Betamax, 2000, ktp) kaj la normojn (PAL, SECAM). La filmo estas *senpage* prunteprenebla de: Commission of the European Communities, Film-Library, M. Liefbrig, B 1 – 118, B 1049 BRUSSELS/BRUXELLES, Belgujo.

## ESPERANTO VIGLAS

Mensstreĉajn Esperantajn Kurson por mez-kaj altgradaj lernantoj ja ĝuis samideanoj en julio sub instruado de Don Lord kaj Stephen Thompson. Tio okazis en la Universitato de Loughborough, kie Esperantistoj oportune povas studferii, aŭ sole aŭ kun la familio. Kapablaj helpantoj prizorgis pri la idoj en infanvartejo kaj ludgrupo. La gejunuloj povis elekti inter klasoj aŭ sportaj aŭ kreaĵ. Krom Esperanto, oni

proponis preskaŭ tridek diversajn kursojn por plenaĝuloj.

Matene kaj posttagmeze la samideanoj plibonigis sian Esperanton. Niaj kompetentaj instruistoj klarigis al ni diversajn problemojn pri gramatiko, prononcado kaj la ĉiutaga uzado de nia bela lingvo. Ĉu per lingvosonbendo, ludo aŭ kanto, ĉu per fantazia ĝena situacio, el kiu oni devis parole elturniĝi, ni ĉiuj plispertiĝis.

Ĉiun vesperon, oni proponis diversajn distraĵojn – dancadon, briĝon, iluziiston, plurajn ekskursojn, vingustumadon, kaj diskotekon por junkoruloj. Poste, en drinkejo kunvenadis geamikoj por babili, malstreĉiĝi – kaj drinki, kompreneble – kaj ĝui la amikan etoson sur la universitata tereno. Ĝis malfrue la samideanoj, kun alilandanoj kaj alikursanoj, ĝoje kantadis en komuna ĉambro.

Bonajn manĝojn ni ĝuis la tutan semajnon, kun abunda elekto eĉ por vegeteranoj. Je la lasta vespero, ĉiuj kunvenis por bonega bankedo lukse prezentita.

Enmiksigaŭte kun alikursaj lernantoj dum libertempo, la Esperantistaro trovis oftajn okazojn por disvastigi la dirajon, ke "Esperanto viglas".

**Joyce Bunting**

## ZAMENOF – FESTO EN LA VERDA STELO, STOKE-ON-TRENT

La Zamenhof-Festo okazis je sabato la 16a de aŭgusto en la trinkbufedo La Verda Stelo, Esperanto Way, Smallthorne, Stoke-on-Trent, kaj post la ceremonio okazis la jarkunveno de la brita sekcio de I.F.E.F. (Ken Hart el Birmingham prezidis; sekretario, Frank Curtis el Cheltenham).

Granda nombro de geamikoj el diversaj partoj de la lando ĉeestis la ceremonion; Mark Fisher, parlamentano por la meza parto de la urbego pendigis la florkronon sur la granda ardeza verda stelo kiu staras apud la enirejo de la

Verda Stelo. Paul Gubbins (prezidanto de la Norda Staffordshire Klubo) prezentis la ĉefan gaston kaj Vilĉjo Simcock (sekretario) dankis lin.

Post la ceremonio iuj ĉeestantoj vojaĝis al Barlastono por partopreni la 26an ĉiujaran somer-lernejon (direktis: D-ro Marjorie Boulton).

### LA LASTA HOMO: 1999

de  
Sandra Slade

Perdita en spaco kaj tempo, turnante malrapide  
En la universo, mi estas izola.  
Ĉirkaŭe brilas steloj. Bela tero estus malsupre,  
Sed la mondo estas malaperinta.  
Ŝajnas, ke la fina, plej granda milito erupciis  
Dum mi efektivigis la mision,  
Kaj la profetaĵo veriĝis: la homaro sin detruis.  
Nun mi alfrontas mian propran morton –  
Kien mi povus iri en ĉi tiu nigra malpleneco?  
En mia stantombo, mi provas preĝi.  
Eble iun tagon trovos min alinaciano  
Kaj eble li haltos por fiksrigardi.

Ĉi tiu poemo gajnis premion ĉe la 3-a Dorking-a Esperanto Eisteddfod, Junio, 1986.

### KIEL VANAJ, EFEMERAJ ESTAS LA ĜOJOJ DE HOMO

de  
Sandra Slade

Kiel vanaj, efemeraj estas la ĝojoj de homo,  
Kiel mallonga lia vivo, el aflikto farita.  
Malmultaj la jaroj de lia asignita etendo,  
Velkiĝos rapide lia memoro nefortiginta.  
Sur la sabloj da tempo, treege mallongan impreson  
La plej grandaj kaj la plej favoraj uloj povas lasi;  
De pli malpli mortemuloj restas nenia signeto,  
Kaj ni mortas kiam neniu restas por ni malĝoji.  
Do, kiu memoras mian nomon dum la estonteco,  
Aŭ parolos kun iom da kareco pri miaj vortoj –  
Memorante, ke mia nura pretendeto al famo  
Kuŝas en la koro kaj substanco de miaj versaĵoj.

Se, dum la estontaj jaroj, mildaj legantoj do vidos  
Ĉi tiujn liniojn, eble pri mi ili bone pensos.

### Norwich Jubilee Esperanto Foundation

This is the 19th and last report of the first honorary secretary of the Foundation. The non-expendable capital now exceeds £27,000 and the yearly expendable income £4000. This is a wonderful result for the dream of the late Alderman Edward Frederick Dean of Norwich. The Foundation can be proud of the fact that the President of the World Esperanto Youth Organisation, who is also the Chairman of the Esperanto Residential Centre in England, and two of the Foundation's trustees made their first Esperanto journeys abroad with the help of a grant from the Foundation. Another four or five have worked as volunteers at the World Esperanto Headquarters in Rotterdam. Well over another hundred young people have benefitted from the fund, a few receiving several grants each amounting to sums between £700 and £1000. The total value of the awards made since 1967 reached over £16,000; the total number of letters received was 3,500 and the letters sent over 5,500. It has always been the hope of the Foundation that earlier recipients, when older, would support it and so help future generations of young learners of the language to use it abroad.

I am convinced one cannot learn a language only in a classroom. It is not sufficient to learn to read and write Esperanto, nor to speak it only in one's home country. One becomes a keen Esperantist when one speaks it as the only means of communication in a strange land. The real value of the Foundation is that it can provide the means so that young students can use Esperanto in the way it was intended to be used and become active and enthusiastic workers for its furtherance. Seven young people were given financial help towards the cost of attending the World Esperanto Congress in China. What an experience! How many will the Foundation be able to help to attend

the centenary World Esperanto Congress in Poland next year? It will depend upon the support. Substantial as the funds now are, additional money is needed if the Foundation is to continue to do and increase the valuable work it has done in the past.

The Foundation will always be a fitting memorial to its founder, but in addition a room at the newly opened Esperanto Hotel is being called The Norwich Jubilee Esperanto room coupled with his name. This has been made possible by a legacy of £500, but another £500 is required. We make an earnest appeal for numerous small contributions in memory of 'Ted Dean' to meet the remaining sum required. These should be sent to Dr Kathleen Hall, the new honorary secretary, at her own address, 37 Granville Court, Cheney Lane, Oxford, OX3 0HS, which is also the address for other future correspondence.

Finally, may I thank you all for the encouragement and support you have given me during the past 20 years. You have made my work worthwhile. I am pleased that Raif Markarian is continuing as Educational Director and am confident that with his wise counsel and your continued support the Foundation will flourish and reach new heights under the able secretaryship of Dr Kathleen Hall.

Signed

Norman Williams, M.A., B.Sc.,  
F.B.E.A.

Hon. Sec 1966-1986

### PREZALTIGO

FONTO (literatura revuo) kaj SIMPOZIO (filozofia revuo) bedaŭrinde kostas pli pro la kurzo de la pundo. La peranto por Britujo, Dr. Albert Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, ĝiro 17 300 4008, petas abonantojn pagi la abonprezon: £11 por FONTO, £2.25 por SIMPOZIO

# ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj.  
Antaŭpagenda.

ESPERANTO FOR ALL at  
Belstead House, Ipswich IP8 3NA. Tel: 0473  
686321

20-22 February 1987.

Classes at four levels. Excellent food and  
accommodation. Tutors: Don Lord, Alan  
Nutton, Sally Philips, John Brownlee.

£43 (Resident), £30.50 (non-resident). Lower  
rates for Suffolk Applicants.

Application form from Belstead House.  
Apply now but successful applications are  
not confirmed until December.

**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA**  
(SAT) celas instigi homojn per Esperanto al  
racia pensado pot faciligi rilatojn inter la  
laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT  
en Britio, 29 Farrance Rd, Romford, Essex  
RM6 6EB.

## You could set up a Special Memorial

**Fund** within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from: Dr. K. M. Hall, 37 Granville Court, Cheney Lane, OXFORD, OX3 0HS.

### *Volas Korespondi*

Ryszard STEMPIEN, 33-jara, str. C.Skłodowskiej g., 59-890 Zawidów, Pollando interesiĝas pri sporto, filatelio, turismo, fotado, moderna muziko kaj Esperanto.

Masoud Honoar Baĥs P.O. Box 47617-156, Mazenderan-Qaemschr, IRAN 23-jara studento volas korespondi.

Halina Sikora, Ul. Krucza 53/5, 53-410 Wrocław, Pollando, 34-jara lernantino de Esperanto volas korespondi.

M. Jafari, Sarbaz Shahzo, Bag Safa-Hassan Abad, N-ro 25, P. Okode 51436, TABRIZ, IRAN. 17-jara fraŭlo kiu scipovas Germane, Angle kaj Esperante volas korespondi kun Britaj kaj alilandaj knabinoj 15-17-jaraj.

Ramin Ekhtiari, 33 Plaque Esmatieh Lane, Toorkmahalleh Kargar Ave., 47619 Quaemshar, IRAN lernanto volas korespondi kaj iamaniere akiri Esperanto-gazetojn.

Chao Miao Fa, Wenling Farmacia Fabriko, Zhejrang, Ĉinio. komencanto volas trovi Esperantajn geamikojn. Ŝatas fremdajn lingvojn. (kolektas p.m.), kantadon, briĝon, fakultato estas filozofio kaj teoria fiziko. Sopiras al Esperanto-materialo.

Oawel NOWOGORSKI 20-jara studento, lernas Esperanton ekde tri monatoj, volas korespondi kun gebritoj por ekkoni pli bone Esperanton. Intereso: muziko, lingvoj vojaĝi, bildkartoj, poŝtmarkoj, adreso Moch-naczka Nizna 57, 33-383 Tylicz, woj. Nowy Sacz, Pollando.

Artur TOMCZEWSKI, ul. Stary Rynek 7, PL-09-320 BIEZUN, Pollando, 17-jara sperta Esperantisto volas korespondi kun gebritoj. Intereso porkomputilaj artefaritaj lingvoj. Konas la Rusan kaj Francan.

Yiğit Özgüven, Pk.17 (810 70), Suadiye/Istanbul, Turkujo viro kiu ĵus studis Esperanton pere de la libro "Teach Yourself" kaj serĉas korespondamikojn.

Karel Krejča, Pod Hybšankov 2348/17, 15000 Praha 5 – Smichov, 28-jara kolektas b.k. pri urboj, g-diskojn, interesiĝas pri filmoj, teatro, kulturo kaj muziko, korespondas Esperante.

Esperanto grupo en Hungario volas korespondi kun brita grupo aŭ individuoj. Ili estas 20-30 jaraĝaj, 4 knabinoj, kvar knaboj el tiuj 2 geedzoj, ĉiuj komencantoj; intereso multaj inkluzive de intervizitoj. Skribu al: Erzsebet SEBOK, 1201 Budapest, Klapka u. 38, Hungario.

Nora Somogyi, Balatongozsok, Fö u. 95, 8131 Hungario, dudek-jara instruistino, volas korespondi kun Brito 20-25 jara.

Kevin Mowlai, Yahjaabad 161, ZIP 44176, LAHIJAN, IRAN 17-jara knabo volas korespondi kun junulo en Britujo, en Esperanto aŭ angla.

S-ino Maria Levai, Jozsef A Str. 31.VII.46, H-5000 Szolnok, Hungario volas korespondi kun anglaj personoj, precipe el Londono. Ŝi havas edzon kaj tri gefilojn – ordinaraj intereso sed precipe la homoj. Kolektas kolorajn bildkartojn. (Foto kaj ŝia letero haveblaj ĉe EAB.)

Lluís Soldevila Momino, Serapi Farre, 13-16-3<sup>o</sup> -5<sup>è</sup>, Manresa. Hispanio 55-jara administranto pri diversaj temoj.

Machlik Mario, Leva kòz 2. III/4, 7400 Kaposvar, Hungario, dudekjara studento de muziklernejo, ludas violonĉelon kaj volas kontaktiĝi kun samideanoj kiuj ludas arĉinstrumentojn.

Attila Kaloczi, Epitoh ulja 58, 7090 TAMAS. Hungario 18-jara studento volas korespondi kun angla knabino 15-17-jara.

Jan ARENDARCRYK, Plac Wolnosu 13/3, 58-420 Lubawka, Pollando, nova samideano kiu komemcis lerni antaŭ unu jaro. Kolektas bildkartojn kaj etajn monerojn.

## ALVOKO AL KUNLABORO

Por ke *Voĉo de Handikapuloj* ne estu plorkolektanto au nur helpkrio de malavantaĝuloj, ni petas ĉiujn verkemajn homojn kiuj havas intereson por handikapuloj kaj handikapuloj mem kunlabori en nia gazeto. Ĝi deziras pritrakti jenajn temojn el pluraj vidpunktoj:

1. Diferenco inter denaska kaj poste trafita handikapiteco;
2. Handikapita korpo kaj kreaĵ potencoj;
3. Handikapulo – sana homo;
4. Socio, medicino, ekonomio kaj handikapitaj homoj;
5. Esperanto – handikapuloj.

Viaj kontribuajoj pri supraj temoj devas esti de du ĝis maksimume tri paĝoj, tajpitaj kun interspaco kaj marĝeno, en bona lingvo.

La materialon bv. sendi al adreso: *Voĉo de Handikapuloj*, red. Dusan Adnadj, Skolska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Noto: La jarabono inkluzive membrokotizon estas 5 US dolaroj au egalvaloro. Pagojn bv. direkti al supra adreso.

## ESEA KONKURSO

“Laboro en la dudekunua jarcento el la vidpunkto de laboristo”

Per esperant-lingva eseo de ne pli ol 3.000 vortoj pri la supra temo vi povas gajni

SENPAGAN PARTOPRENON, inkluzive de veturkostoj laŭ SATEB bontrovo, en KONGRESO de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) okazonta en Eŭropo.

Rajtas konkursi esperantistoj, kiuj loĝas en la Britaj Insuloj.

LIMDATO por ricevo de eseoj (prefere tajpitaj!) estas la **30a de Novembro, 1986**.

Kunsendu vian nomon kaj adreson. Ĉiu konkursanto ricevos informon pri la rezulto.

Alec Venture en kunlaboro kun Wim Prent prijuĝos la konkursaĵojn.

WORKERS ESPERANTO MOVEMENT (SAT en BRITIO) prezentas ĉi tiun premion honore al la JUBILEA JARO 1987. SATEB rezervas la rajton presigi la premiitan escon.

Sendu viajn eseojn al: SATEB, 29 Farrance Rd, Romford, Essex RM6 6EB.